

MIR MEKORO 16



DECEMBRO 2011

MIRMEKOBO 16

decembro 2011

Redaktoro: Donald Broadribb

donbroadribb@mirmekobo.com

Sur la unua paĝo: Leonino grimpas malsupren por savi sian idon.

Nova retejo de Mirmekobo!

La URL de la retejo de Mirmekobo estas:

mirmekobo.com

Ĉe tiu retadreso vi povas trovi kaj laŭdezire elŝuti ekzemplerojn de ĝisnunaj numeroj de *Mirmekobo*.

Epoŝte: donbroadribb@mirmekobo.com

TABELO DE ENHAVO

medicino	La mondo sen okulvitroj (de Julia 'Sigmond)	3
skeĉo	La ĝemoj de ĝemeloj (de Margaret Chaldecott)	6
fotoj	Leonino savas sian idon.....	11
esplorado	Odesaj katakomboj (de Aleksandr Samorukov & Tatjana Auderskaja)	17
historio de la scienco	Geometrio kaj sfera astronomio en la unua greka kosmologio, parto 2 (de Jean-Pierre Vernant)	22
korektoj kaj ŝercoj kaj anekdotoj	29
mitologio	Sizifo (de Donald Broadribb)	30
noveleto	Rudolfo kaj la internacia monopolema kompanio (de Donald Broadribb)	31

Ĝenerala Informo

Mirmekobo estas per-interreta eldonaĵo senpage abonebla, ankaŭ individuaj numeroj estas senpage haveblaj. Ĉiu persono rajtas kontribui al la enhavo de *Mirmekobo*. Neniu surpapera formo de *Mirmekobo* ekzistas, ĉar la presado kaj dissendado de surpapera ekzemplero estus tre multekosta, same ankaŭ la abono. Tamen, vi rajtas libere presi per via komputilopresilo por vi aŭ por alia(j) persono(j) ekzemplero(j)n de *Mirmekobo*. Ankaŭ la perretan formon vi rajtas libere dissendi. La formato de *Mirmekobo* estas A5.

medicino

La mondo sen okulvitroj

de Julia 'Sigmund (Italio)

La maljuna aĝo alportas ambiguajn donacojn por la homo.

Memkompreneble ĉio dependas de la sanstato.

Multaj homoj, por ke mi ne diru la plimulto (almenaŭ en Eŭropo), vivas en juneco facilanime. La pli aĝaj, jam spertaj, vane konsilas al ili: “NE FUMU!”, “NE DRINKU!”, “VIVU PLI SAĜE!”, ja la junularo mem devas sperti la ĝuojn de la vivo, kaj poste — maljuniĝinte — ili pludonas la konsilojn al la junularo, menciante, ke june li/ŝi ne aŭskultis la saĝajn konsilojn, kaj jen, nun, kiel oni devas suferi pro neobeo.

Cetere mi konis viron, kiu nek fumis, nek drinkis, tamen, je la 70-jaraĝo malsaniĝis pro pulmo-kancero kaj mortis. Nekredeble, ĉu? Sed ankaŭ la alian ekstremon mi spertis, ĉar mi konas 90-jaran viron, kiu ĉiutage trinkas 100 dl. da forta brando, kaj fumas tri cigaredojn post la tri manĝoj — matene, tagmeze kaj vespere — kaj tamen li akoraŭ estas ne nur laborkapabla, sed ankaŭ mense freŝa, pri ĉio interesiĝanta. Nu, esceptoj ĉiam ekzistis! Kiel oni diras: “Escepto konfirmas la regulon!”

Mi mem feliĉe apartenas al tiuj instinkte saĝe vivantaj homoj, kiuj maljuniĝinte ne havas iun specialan malsanon. Tamen... (ĉiam estas unu *tamen* aŭ unu *sed*, ĉu ne?) Nu, dum 65 jaroj mi portis okulvitrojn, sed mi bezonis konstante pli kaj pli fortajn lensojn. Legi — mi legis sen okulvitroj, sed mia nazo alproksimiĝis pli kaj pli multe, kaj preskaŭ jam atingis la legatan libron. Same kiam mi skribis, mi devis tute alproksimiĝi al la papero, ke mi vidu miajn proprajn literojn.



Katarakto

Intertempe du miaj amikinoj estis operacitaj pri katarakto. Ili feliĉe rakontis al mi, ke ili povas legi normale, sen okulvitroj. Mi iomete pripensis, ke ankaŭ mi devus iri al tiu tre lerta kaj brava



Normala okulo

okulistino por esplori kaj konsulti.

La iom pli juna ol mezaĝa doktorino, ĉiam ridetanta kaj amikece parolanta kun ĉiuj pacientoj, ĉu infano ĉu maljunulo, tuj vekis en mi ne nur simpatian, sed ankaŭ absolutan fidon. Ŝi konstatis la katarakton kaj la neeviteblan, sed ne urĝan operacion ŝi konsilis.

Pasis unu jaro, kiam fine okazis la kuracista interveno. La operacio estis mallongdaŭra, sendolora, iomete multekosta por pensiulino, sed bonrezulte efika. Unu tagon post la operacio oni forprenis la bandaĝon. En tiu momento ŝanĝiĝis mia tuta vivo. La unua, tre feliĉiga sperto estis, ke mi ekvidis la ĉielon **blua!** Se mi rigardis supren nur per la dekstra, ĝi estis griza. En tiu sekundo mi sentis nemezureblan dankemon, ke mi apartenas al la vidantaj homoj!

Dum la sekvaj tagoj kaj semajnoj mi devis ege zorgeme vivi. Skribe mi ricevis la instrukciojn pri kio estas permesata, sed precipe: kiuj aferoj estas malpermesataj, sed la doktorino mem diris al mi tiujn gravajn instrukciojn. Jen ili:

INSTRUKCIOJ

1 - Dum ses semajnoj uzu kolirion, kvinfoje tage metu po unu guton en la operaciitan okulon.

2 - Dum kvin tagoj prenu la medikamenton DICLOFENAC, dufoje po pilolo.

3 - Post la operacio dum unu semajno havu regulan kontrolon ĉe la doktoro, kiu faris la operacion.

4 - Dum 3-4 semajnoj: detenu vin de fizika trostreĉiĝo, portado de pezaĵoj, lokaj traŭmoj. Evitu la venton, polvon, tempeston. Ne dormu kuŝante je la flanko de la operaciita okulo.

5 - Dum ĉirkaŭ unu monato ne klinu malsupren la kapon. Por levi ion detere ne faldu la dorson, sed malsupreniĝu al la tero faldante la genuojn kaj gardante rektaj la trunkon kaj la kapon.

6 - Ne premu nek frotu la operaciitan okulon.

7 - Almenaŭ dum la unua semajno post la operacio nepre trinku ĉiutage 1,5 - 2 litrojn da likvaĵo. Krom akvo vi povas trinki teon, siropon, fruktosukon.

8 - Atentu pri via sangopremo!

9 - Granda singardo necesas je ĉiutaga sinlavado! Akvo ne trafu en la operaciitan okulon!

10 - Dum tri semajnoj post la operacio lavu la hararon *nur* ĉe la frizisto!

11 - Post ses semajnoj iru al kontrolo!

12 - Vi povas uzi okulvitrojn, se tiel vi fartas bone.

13 - Tuj prezentiĝu al la doktoro, se vi konstatas iun ajn ŝanĝon. Pri iu ajn nekutima simptomo urĝe sciigu la doktoron.

14 - *La rezulto de la operacio en granda mezuro dependas de tio, kiel vi zorgas kaj vartas vin mem post la operacio!*

15 - Post ses semajnoj la doktoro, post la kontrolo, povas preskribi novajn okulvitrojn.

16 - Nepre vi programu la kontrolon ĝustatempe!

Dum ĉi tiu periodo de mia vivo mi pripensadis pri la homaj ecoj. La plimulto de la homaro kaj vidas kaj aŭdas. Sed kiu % da ni konscie ĝojas pro ĉi

tiuj bonaĵoj de la vivo, ĉu?! Por preskaŭ por ni ĉiuj la vido kaj la aŭdo estas memkompreneblaj kaj naturaj . Subite mi sentis iun profundan dankemon, sed samtempe sinceran kunsenton kun ĉiuj nevidantoj kaj neaŭdantoj de la tuta mondo.

Post la operacio por mi la mondo sen okulvitroj tute ŝanĝiĝis. Kaj mi planas venontjare la operacion ankaŭ por la alia okulo.

Dio mia! Kiel alie aspektas nun la mondo! Mi ne nur rigardas, sed *vidas* ĉion pli bone. Mi ekvidas ne nur la araneaĵojn en la muranguloj de la loĝejo, sed ankaŭ la apenaŭ rimarkeblajn, sekretajn esprimojn sur la homaj vizaĝoj. Mi ekvidas eĉ la promenantan formiketon sur herbeto. Mi vidas ankaŭ la detalojn, kiujn ĝis nun mi ne atentis. Mi eĉ ne sciis, ke ilin oni kapablas vidi! Mia feliĉo malfacile estas esprimebla.

Ne nur teorie, sed ankaŭ praktike mi konscias, ke super la flugantaj nuboj la ĉielo ĉiam estas blua!



Pingvenoj en Antarktiko

skeĉo

La ĝemoj de ĝemeloj

de Mikaela Tritiko (pseŭdonimo de Margaret Chaldecott)

La kurtenoj malfermiĝas. Meze de la scenejo staras tri personoj: la reĝisoro kaj du aktoroj. Ili interparolas, legas paperojn. La reĝisoro subite rimarkas ke la scenejo estas videbla. Li iras antaŭen kaj vokas...

Reĝisoro: Ho, ve, vi ĉe la kurtentirilo — fermu la kurtenojn. Ni ne estas pretaj!

La kurtenoj fermiĝas. Post kelkaj sekundoj la reĝisoro elvenas.

Reĝisoro: Bonvenon, geamikoj, kaj mi petas vian pardonon. Vi ĉiuj venis ĉi tien por aŭdi kaj vidi la plej freŝdatan skeĉon de la fama verkistino Mikaela Tritiko. Mi bedaŭras ke pro diversaj kaŭzoj, ni ne estas pretaj. La manuskripto alvenis nur hieraŭ, kaj kvankam ni unue diskutis inter ni kiu ludos kiun rolon, kaj la aktoroj jam legis siajn rolojn private, ili ĝis nun ne provprezintis la skeĉon. Ŝajnas ke la unuaj ekzempleroj de la manuskripto perdiĝis survoje, kaj la verkistino devis rapide retajpi la paĝojn. Vi, kara aŭdantaro, estas tre pacienca, kaj mi kore dankas vin, kaj nun mi havas la honoron prezenti al vi ... (legas la paperon) *La ĝemoj de ĝemeloj*. La du aktoroj estas Kastoro kaj Polekso (*li denove rigardas la paperon*) Polukso¹. La tempo estas la nuntempa. La urbo estas la ĉiteia.

(Li reiras malantaŭ la kurtenojn, kiuj denove malfermiĝas. Meze de la scenejo estas la rolantoj. Ne gravas ĉu ili estas similaj laŭ aĝo aŭ alteco. Ili firme tenas la paperojn kaj legas...)

Kastoro: Bonan tagon, mia sinoamiko. Ĉu vi ankoraŭ amas min? Belaj estis la tagoj kiam ni estis junaj knaboj, kaj la patrino tiel mirinde zorgis pri ni. Krom la maloftaj atakoj de astro, ni ambaŭ estis tre sanaj, kaj do feliĉaj.

Polukso: (*Interrompas, ne legas.*) Astro?

Kastoro: Kio? (*Rigardas la manuskripton:*) Necesas korekto, mi pensas. Devas esti “atakoj de astmo”. (*Laŭ la maniero de aktoro:*) Kompatinda panjo, ŝi unufoje diris ke dum nia unua atako kiam ni fajfspiris kaj tuis, ŝi suferis pro historio ... (*paŭzas*) ... Mi relegu tion ... kaj tuis, ŝi suferis pro histerio. Sed ŝi vartis bone pri ni kaj ni fartis bone.

Polukso: Mi memoras ke ŝi estis tre lerta kuiristino ... kudristino. Niaj varmaj veŝtoj kaj la lanugaj manumoj kaj kolumoj estis la plej belaj vidataj sur la strato. Kaj kia estis la ĵaluzio de la aliuloj en la lernejo kiam ni portis niajn novajn biretojn?

Reĝisoro (*subite, ĉar ĝis nun li ŝajne legis aliajn paĝojn:*) Polukso, mi petas, relegu tiujn vortojn.

Polukso: Kiamaniere? Pli laŭte, aŭ pli rapide?

Reĝisoro: Ne, legu ilin per via menso; pensu pri la signifo de ĵaluzio. Kiaj estas la fenestroj de via domo? Ĉu ili havas ŝtirojn kontraŭ la suno kiujn oni nomas ĵaluzioj? Kaj pensu pri la aliaj vortoj kiujn vi legas. Vi devas legi la tekston zorge, ĉar vi scias ke la verkistino devis tajpi la paĝojn rapide kaj eble aperas eraroj. Do mi ripetas, legu lerte. Ek!

Polukso: (*al la reĝisoro:*) Mi pardonpetas. (*Li legas la paperon, kaj uzas krajonon*) Jes, vi pravas, estas eraroj. Mi legis nur per la okuloj, ne per la menso. (*Al Kastoro:*) Niaj varmaj vestoj kun la lanajaj manumoj kaj kolumoj estis la plej belaj inter ĉiuj vidataj en la strato. Kaj kia estis la ĵaluzo de la aliuloj en la lernejo kiam ni portis niajn novajn ... (*al la reĝisoro:*) Mi ne rajtas diri “biretojn”, mi pensas — ili estas kardinalaj kapvestoj, sed beretoj estas malgrandaj beroj, ĉu ne?

Reĝisoro: Certe, beretoj estas malgrandaj beroj; sed bereto estas tia ĉapo kiam mi portas ... (*li demetas sian bereton kaj montras ĝin*)

Polukso: Kiam ni portis niajn novajn beretojn! Jes, mia frato, tiuj estis tre feliĉaj tagoj.

Kastoro: Vi estis spertulo ĉe la gimnazio — ĉu vi ankoraŭ estas atleto?

Polukso: Vi devas diri “gimnastejo”. Ĉe la gimnazio vi estis spertulo pri kurso kaj ĉe la gimnastejo, mi estis spertulo pri kurado. Jes, mi ŝatas sportojn!

Polukso: Multaj estis la disputoj — ne, diskutoj — pri niaj venontaj karieroj, kaj kiel la gepatroj plendis pri la doloroj elspezataj dum niaj jaroj da edukado!

Polukso: Doloroj? Ne dolaroj?

Kastoro: Eble, sed mi vetas ke vi, en viaj adultaj jaroj, trovis ke unu iras kun la alia.

Polukso: Frato mia, vi insultas min! Mi postulas vian apologon! Kion vi scias pri mia vivo kiu devigas vin nomi min adulta? Adolte mi multe vojaĝis tra la mondoj, kun multaj aventuroj, sed tute sen aventurinoj.

Kastoro: Se vi estus ministro, estas dubinde ĉu vi trovis aventurinojn² — sed ĉu ne estis aventuristinoj kiuj gaje elspezus vian monon?

Polukso: Sur la maro? En miaj tramondaj vojaĝoj mi trovis nur amindan virinon. Pri ŝi mi sendis al vi la literon — ne, leteron — pri mia antaŭnelonga edziĝo.

Kastoro: Ne estas ofte ke oni ricevas en la postoj tian sokon³. Vi, la ĉiama fraŭlo.

Reĝisoro: Mi ripetas kaj repetas — legu viajn paĝojn kaj pensu. Eble plenkreskulo adultas, sed ne ĉiuj plenkreskuloj estas adultaj. La pli mallonga vorto estas “adoltoj” kaj sendube okszis tajperaro. La vorto “insulti” estas penseraro. Vi volas diri “malhonoras” aŭ “ofendas”. Oni ne donas “apologon” post ofendo, sed “apologion”. Kaj, jes, Kastoro, aventurino ne estas virino diamantamanta ...

Ĝemeloj (*kunkune*): Kia aĉa ŝvarcaĵo⁴!

Reĝisoro: Finfine, ŝajnas ke la tajpistino perdis du supersignojn — relegu “poŝto” kaj “ŝokon”.

Kastoro: Ne estas ofte ke oni ricevas en la poŝto tian ŝokon. Vi, la ĉiama fraŭlo. Mi ĝojis ricevi vian leteron en la poŝto — poŝto — pri via lastatempa edziĝo, Kiu estas via edzino, ĉu mi konas ŝin?

Polukso: Mi dubas. Ŝi estas svelta blondulino, kun bukla fringo kaj la plej belaj okuloj. (*Al la reĝisoro:* ĉu fringo estas ĝusta? Antaŭ kelkaj tagoj mi aĉetis paron da birdoj kaj oni nomis ilin “fringoj”. Kio estas en via manuskripto?)

Reĝisoro: Franĝo.

Polukso: Mi dankas vin. (*Denove al Kastoro:*) Kun bukla franĝo kaj la plej belaj okuloj. La franĝo preskaŭ kovras la brovojn super tiuj mirindaj okuloj. Ŝi kuras tre lerte.

Kastoro: Ĉu? Ĉu ŝi kuras post vi aŭ antaŭ vi? Kiu ĉasis, kiu kaptis?

Polukso: Ho ve, alia eraro. Ŝi kuiras tre lerte. Ŝia patrino diris ke la vojo al vira koro estas laŭ la ventro, do dum jaroj ŝi studis pri la kuirado. Mi ja trovis trezoron. Ŝi laboras ĉe la benko ...

Reĝisoro: Banko!

Polukso: ... banko apud la kanelo.

Reĝisoro: Kanalo, kanajlo vi!

Polukso: ... banko apud la kanalo kie, akirinte mian boaton, mi devis atendi ĝis la doganisto atentis miajn paperojn. Ŝi vidis la velon kaj estis scivolema pri ĝi. Ŝajnas ke ŝi ĉiam volis iri sur boacon ...

Kastoro: Kial? Ĉu ŝi estis filino de Avo Frosto?

Polukso: Ne, certe ne — kia idiotismo estas tiu demando?

Kastoro (*pedagoge*): Ĝi ne estas nelogika vortkonstruo; eĉ ne estas idioĵaĵo. Vi diris, ke via amatino volis iri sur boacon; boaco estas la norda cervo kiu tiras la sledon de Avo Frosto. Eble vi volas diri ke bonŝance, via amatino ankaŭ ŝatas la vivon en kaj apud kaj koncerne boatojn. Vi estas feliĉa homo, trovinte tian trezoron. Ĉu ŝi havas grandan interezon je la boato?

Polukso: Ne, ŝi ne estas financa fianĉino, tamen ŝia patro tre malavare dozis ŝin.

Kastoro: Kio?

Polukso: ... dotis ŝin kiam ni metis la avison en la ĵurnalo pri la venonta edziĝo.

Kastoro: Avison?⁵ Ne avizon?

Polukso: Avizon, jes. Li donis al ŝi grandan ĉenon — ne, ĉekon. Sed jes, ŝi havis grandan intereson je la boato.

Kastoro: Kiam vi edziĝis? Mi bedaŭras ke mi ne ĉeestis ĉar, kiel via plej frua kunludanto, mi tre volus esti staranta kun vi ĉe la altaro dum la nupto. Sed mi devis labori eksterlande kaj tute ne povis reveni. Ĉu via amatino estis bela edzino? Mi komencis novan serion de fotoĵoj pri la kutimoj en diversaj landoj, inkluzive pri la nuptofestoj. Ekzemple, multaj virinoj, ĉefe la patrino de la nova edzino, ploras; mi ne scias kial. Ĉu ili ploras pro ĝojo, aŭ ĉar ili antaŭvidas la problemojn antaŭ la naivulino?

Polukso: Mia bopatrino ploris dum la ceremonio; multaj lardoj — ho ve, larmoj — fluetis laŭ ŝiaj vangoj, kaj ŝi forviŝis ilin per la pinto de la ŝelo kiu kovris ŝiajn ŝultrojn.

Kastoro: Via bopatrino ŝajne havis molan koron kaj malmolan haŭton; sed eble sur via skribaĵo la vorto devus esti “ŝalo”.

Polukso: Vi pravas. Nu, ĉiu fraŭlino ravas en la tago de sia edziniĝo. Mia Brigita estis eĉ pli bela ĉar ŝi ĉiam estis bela. Sur ŝia belega blonda hararo estis la plej ĉarma ... (*paŭzas kaj relegas*) punta vualo? (*Al la reĝisoro: laŭ angla boatlibro, “punt” estas prameto.*)

Reĝisoro: Jes, sed nialingve “punto” estas maldensa teksaĵo. Punta vualo ne estas tajperaro, kvankam la vortoj aspektas eraraj.

Polukso: Mi dankas vin. Ĉe la dorno de ŝia robo estas elefanta — ne, eleganta — rubando ... (*paŭzas kaj relegas*) ... ĉe la dorso estas rubando. Ŝi portas bukedon de falsaj rozoj kaj papaĵoj ...

Kastoro: Kia nekutima bukedo!

Polukso: Pardonu min. Ŝi portis bukedon de falvaj rozoj kaj papavoj. ...

Kastoro: Kiajn florojn ŝi portis? Falsajn aŭ flavajn?

Polukso: La floroj ne estis artefaritaj, kaj ilia koloro estis tre hele flava — ŝi priskribis ilin kiel “falvaj”, do mi uzis la vorton. Mia Brigita estis la plej bela edzino. Estas, ja.

Kastoro: Estas bedaŭrinde ke mi ne povis uzi miajn solajn, unikajn fraton kaj bofratinton en la serio!

Polukso: Se vi vere volas fotografi nin, venu al nia nova domo kaj ni povos denove vesti en la edzfestaj vestaĵoj. Brigita estas bele dresita en blanka kotono ...

Kastoro: Ho, ve, vi ankoraŭ ne konas multon pri virinaj aferoj. Kotono ne taŭgas kiel ŝtofo de edzinrobo. Kaj pri la robo mem — ĉevaloj estas dresitaj. Ĉu vi jam pensas ke via ĉarma Brigito estas ĉevalinaĉo? Tiel frue? Kara frato, mi simpatias ...

Polukso (*al la reĝisoro:*) Mi tute ne volas daŭrigi ĉi tiun turmentadon. En preskaŭ ĉiu linio estas tajperaro. Kaj kiam mi volas improvizi, li kritikis min. Sed li mem fuŝas sian improvizon, ĉar se li pensus, li dirus “kunsentas”. Li devus kritiki la trikantan Tritikon.

Polukso (daŭre parolas): Ĝis vi trovos taŭgan teatraĵon, mi diras ... Ĝis! (*disŝirinte la paperojn, li foriras.*)

Reĝisoro (*surprizita, vokas ...*) Vi ĉe la kurtentirilo, fermu la kurtenojn! *Li reaperas antaŭ la kurenoj kaj diras:*

Se la eraroj vin ofendis,
Kaj la aktoroj multe plendis,
Vigliĝis viaj pensoj.
En la vortludo mi prezentis
Ĉu la insidojn vi atentis?
Ja vivas viaj sensoj!
Ho ve, denove.
Sencoj!

¹Kastoro kaj Polukso estis mitaj ĝemeloj romaj kaj helenaj.

²Aventurino/aventuristino. Aventurino = mineralo, speco de kvarco.

³Soko/ŝoko. Soko = parto de plugilo.

⁵Ŝvarĉaĵo: Raymond Schwartz (1894-1973) = tre populara humoristo, kabaretisto, kaj verkisto. Li famiĝis pro sia lerta vortludado.

⁴Aviso/avizo. Aviso = nearmita militŝipo portanta komunikaĵojn.

[Noto de la redaktoro: la teksto estas iom redaktita. Nur pri kelkaj tre nekutimaj terminoj uzitaj en la vortludado mi atentigis per piednotoj.]

fotoj

Leonino savas sian idon



fotis Jean-Francois Larget

Leonino alarmite indikas ke ŝia ido falis trans klifan.



fotis Jean-Francois Largot

Aliaj leonoj sensukcese strebas helpi.



fotis Jean-Francois Largot

La leonino malsupren grimpas por atingi la idon.



Si plugrimpas malsupren

fotis Jean-Francois Largot





fotis Jean-Francois Largot

Reportinte sian bebon, la patrino ame lekas ĝin.

Ĉi tiuj fotoj aperis en amasego da raportoj en septembro -novembro 2011.
Distribuis Sax Rohmer Ltd.

esplorado

Odesaj katakomboj

de Aleksandr Samorukov, trejn-esploristo de la klubo “POISK”
kaj Tatjana Auderskaja
Fotoj de A. Samorukov

Kvankam Odessa originis en 1794, ĝi staras sur katakomboj kaj sur legendoj. La legendoj kaj katakomboj estas ĉe ni interplektitaj.

Ĉu vi scias, kio estas odesaj katakomboj? Ili havas neniun rilaton al tombejo. Ili estas labirinto de malplenaj galerioj, aŭ tuneloj, kiuj restis sub Odessa post minado de kalkoŝtono, el kiu estas konstruita malnova Odessa. Do, se tiel diri, ili estas “negativo de Odessa”: la urbo estas konstruita el la ŝtono, kaj sub la urbo restis samvolumena malplenaĵo, subtera mal-urbo. La totala longeco de tiu tute ĥaosa labirinto (ja oni elprenis la kalkoŝtonon en multaj lokoj, diversdirekten, sen ajna skemo aŭ plano) superas 2 mil km; kaj surmapigita ĝis nun estas nur triono de ĝi, kaj proksimume duono restas tute nekonata. Ekzistas multaj tuneloj, pri kiuj oni konas, sed neniam sukcesis trovi ilin. Multaj el ili nun plenas je akvo.



La produktado de kalkoŝtono komenciĝis en la 1820-aj jaroj, baldaŭ post la fondo de Odessa en 1794, kaj daŭris ĝis la 60-aj jaroj de la XX jc. Oni tranĉis la

molan ŝtonon per segiloj, kaj la pretajn blokojn oni forveturigis per ĉaroj tirataj de ĉevaloj. En la plej larĝaj koridoroj ĝis nun restis profundaj spuroj de radoj en grunda planko. Kaj sur la muroj sporade aperas desegnaĵoj — jen 100-jaraj, jen pli novaj...



Jam ekde la mezo de la XIX jc en la forlasitaj minoj ekloĝis homoj. Ili estis ministoj, ekloĝintaj “proksime al laborejo”; poste ilin sekvis kontrabandistoj, kiuj per subteraj tuneloj transportadis varojn trans limojn de “*portofranko*” (sendogana zono); kaj dum la tempestaj tempoj de la komenco de la XX jc tie kaŝis sin revoluciuloj kaj dizertintoj de ĉiuj armeoj.

En 1919 jaro tie funkciis subtera tipografio; en 1941-1944, dum faŝista militokupado de Odessa, en katakomboj troviĝis lernejo, uzinoj de municio, stokejoj, staboj kaj loĝejoj de partizanaĵo. Tie kaŝis sin ankaŭ loĝantoj de apudaj domoj dum bombardado kaj militatakoj. En la periodo de la milito, en 1941-1944 jaroj, en la katakomboj loĝis, konstante aŭ portempe, de 100 ĝis 20 mil personoj! En 50-aj jaroj en odesaj katakomboj oni lokigis grandajn stokejojn, vinkelojn kaj eĉ taksiejon; en 70-90-aj jaroj tie aperis fungokultivejoj. En tiu tempo ankaŭ estis inaŭgurita Muzeo de Partizana Batalo.

Nun Odesaj katakomboj aspektas kiel multkilometra labirinto de subteraj koridoroj, jen altaj kaj larĝaj ĝis 3x4 m, jen etaj 0,2x0,4 m. Estas tie lokoj, kie

oni devas rampi kvarpiede; kie terakvo kovras plankon; estas lokoj, kie minacas “gravedaj” muroj aŭ plafono: konvekso, ŝvelinta pro interna streĉiĝo, preta elfali ajnamomente... Dum longaj jaroj en koridoroj amasiĝis aroj da difektitaj ŝtonblokoj. El ili la savistoj faras apogilojn por “gravedaj” lokoj. Tio iam helpas, sed okazas foje en katakomboj kaj defaloj, kaj alŝutiĝoj... Sed malgraŭ tio, la loko konstante allogas.



Entute, la katakomboj estas Odessa legendo kaj revo de preskaŭ ĉiuj odesaj gebuboj. Dum 200 jaroj ilin kovris aŭreolo de onidiroj, timigaj rakontoj, gloraj rememoroj pri milita tempo, kiam tie troviĝis Odesa Rezista Movado — partizanaj taĉmentoj... Allogas ja sekreto de neniam viditaj vojoj, de nigra subtera labirinto, kiu povas alporti ajnan surprizon — de ora trezoro ĝis soleca morto en obskuro...

Verdire, trezoroj tie neniam troviĝis; kaj dank’ al la sav-taĉmento, jam delonge neniu mortis misvoje. Sed animskuiĝo pro risko plivigligas spiriton, donas pliajn kolorojn al la vivo. Kaj pro tio novaj kaj novaj generacioj de odesaj junuloj iras al katakomboj: vidi, senti, sperti, esplori. Esplori mallumajn labirintojn el ŝtono kaj esplori labirinton de sia propra animo. Juneco bezonas tion.



En la katakomboj oni aranĝas konkursojn pri orientado en itineroj de diversaj niveloj. Tiujn konkursojn partoprenas ne nur odesanoj, sed ankaŭ teamoj el aliaj urboj. En multaj subteraj “bazejoj”, kie teamanoj loĝas dum kelkaj tagoj kun propra provizo de manĝaĵoj kaj akvo. Ĉion forĵetendan oni kolektas en plastajn sakegojn kaj forportas supren, ĉar en katakomboj estas ĉiam konstanta temperaturo +14°C, absoluta mallumo kaj kompleta foresto de mikroboj, kiuj povus asimili kaj detruigi la rubon. Do la atmosfero tie estas sterila, kaj konsciaj vizitantoj klopodas konservi ĝin.

Vizitas la katakombojn nemultaj oficialaj ekskursoj kaj memstaraj “aventuremuloj”. Laŭplane esploras ilin nur Odesa klubo “Поиск” (Serĉo, *Esploro*), fondita en 1961. Dum 40 jaroj okazis unikaj trovoj kaj eventoj, kiel, ekzemple, esploro de kaverno “Natalina”, pli ol 1 km longa, aŭ 3-taga ekspedicio el vilaĝo Nerubajskoje al Odessa, kiam 20 km oni iris sur la tersurfaco, kaj pli ol 100 km sub ĝi, tra subteraj koridoroj!

Jam tria generacio de junularo venas al nia klubo. Ni volonte kontaktos kun aliaj kluboj, kiuj interesiĝas pri speleologio, subteraj kavernoj kaj similaj aferoj. La retadreso de nia klubo estas: samorukov@ukr.net



Kanjono Bryce (Usono)

historio de la scienco

Geometrio kaj sfera astronomio en la unua greka kosmologio¹

de Jean-Pierre Vernant (tr. Marcel Lemeltier)

PARTO 2

Kadre de la civitaj institucioj — tiu civito kiu precize aperas inter la epoko de Hesiodo² kaj tiu de Anaksimandro³ — nenio apartenanta al la publika sfero povas esti difinita de unika individuo, eĉ de la reĝo. Ĉiuj komunajoj devas esti uzeblaj fare de ĉiuj, kiuj konstituantoj de la politika kolektivaĵo: libera debato, publika diskutado okaze de ĝenerala kunveno, per argumentitaj paroladoj. La civito postulas procezon de malsakraligado kaj raciigado de la socia vivo.

Ne plu pastra reĝo, per la observado de religia kalendaro, estas faronta, en la nomo de la grupo kaj por la grupo, tion, kio estas farenda; la homoj⁴ mem ekprenas sian komunan destinon, decidinte post diskutado. Sed, por la civitanoj, la civitaj aferoj povas esti difinitaj nur je la fino de publika debato, pri kiu ĉiu povas libere interveni por prezenti siajn argumentojn. La λογος [*logos*], t.e. la instrumento de tiuj publikaj debatoj, tiam fariĝas dusenca. Unuflanke, ĝi estas la parolado, la diskutado, fare de la oratoroj antaŭ la asembleo; sed aliflanke ĝi fariĝas la racio, tiu kapablo argumenti, kiu difinas la homon kiel ne simple animalon sed kiel “politikan animalon”, racian estaĵon.

Ĉe tia altaĝrada graveco prenita de la parolado, kiu de nun fariĝas la ĉefa instrumento de la politika vivo, ankaŭ respondas ŝanĝo en la socia signifo de la skribado. En la antikvaj proksimorientaj regnoj, la skribarto estis la specialaĵo kaj la privilegio de la skribistoj. Ĝi ebligis al la reĝa administracio per la librotenado kontrolu la ekonomikan kaj socian vivon de la ŝtato. Ĝi kreis arkivojn ĉiam pli-malpli sekretajn, gardatajn ene de la palaco. Tia-ĉi dokumentado ekzistis en la micena mondo inter 1450 kaj 1200_{AKE}.

Sed, ĝi malaperis kun la ruinigo de micena civilizacio, kaj je la momento de nia studado, nome kiam naskiĝis la civito, ĝi estis anstataŭigita per skribado havanta funkcion tute inversan. Anstataŭ esti privilegio de unu kasto, sekreto

¹ Traduko de libroĉapitro: ‘Mythes et pensée chez les grecs’ de Jean-Pierre Vernant.

² ĉ. 700_{AKE}

³ ĉ. 590_{AKE}

⁴ Kiam mi diras “la homoj”, mi parolas nur pri la civitanoj ĉar, ĉiu ja bone scias, tiu politika sistemo supozas, ke aliaj homoj (la sklavo, do ne civitano) devas fari grandparton de la produktodona laboro.

de la skribista klaso, laboranta por la reĝopalaco, la skribado fariĝas “komuna aĵo” por ĉiuj civitanoj, instrumento de publikeco. Ĝi ebligas verŝi en la publikan sferon ĉion, kio povas interesi la komunumon, esceptante tion, kio estas en la privata sfero. La leĝoj estas skribendaj kaj tiel fariĝas ĉies aĵo. La konsekvencoj de tiu ŝanĝo en la socia stato de la skribado, estos fundamentaj por la historio de intelekto..

Se la skribado ebligas publikigi, elmeti sub ĉies okulojn tion, kio en la orientaj civilizacioj ĉiam restis pli-malpli sekreta, sekvas ke la reguloj de la politika ludo, nome la libera debato, la publika disputado, la kontraŭdira argumentado, ankaŭ ili fariĝos la reguloj de la intelekta ludo. Kiel la politikaj aferoj, la scioj, la malkovroj, la prinaturaj teorioj de ĉiu filozofo fariĝos komunaj; ili iĝos komuna aĵo: “κοινᾶ” [*koina*].

Ni havas leteron, ja apokrifan, sed elmontrantan ian kolektivajn psikologion; ĝi estas la letero, kiun Diogeno Laerco (413-323_{AKE}) atribuas al Taleso (624-546_{AKE}), aŭtoro, laŭ iuj, de la unua proza verko) samtempo de Anaksimandro. Skribante al Ferecido, Taleso montras kontentiĝon pri la saĝa decido de Ferecido, ne gardi por si mem sian sciadon, sed ĝin verŝi en la komunumon, “ἐν κοινῷ” [*en koinō*]. Tio implicas publikan diskutadon pri tiu sciado. Aliel dirite, kion faras filozofo kia Ferecido, kiam li verkas libron? Li transformas privatan sciadon en pordebatan objekton analogan al tiu kiu stariĝas en la politikaj demandoj. Fakte, Anaksimandro estas diskutonta la ideojn de Taleso, kaj, tra tiuj debatoj kaj polemikoj, estas starigonta la propran sferon de la historio de la filozofio.

Ŝajnas al mi ke se la greka kosmologio sukcesis liberiĝi pri la religio, se la prinatura sciado malsakraliĝis, tio estas ĉar samtempe la socia vivo mem raciĝis, la administrado de la civito fariĝis plejparte profaneca aktivado. — Necese estas pluen iri. Krom la racia kaj pozitiva formo de astronomio, necesis demandi sin pri ĝia enhavo kaj serĉi ĝian originon. Kiel la grekoj formis sian novan mondobildon? Kiel dirite, tio, kio karakterizas la Anaksimandran universon, estas ĝia cirkla ŝajno, ĝia sfereco.

Vi scias kiagrade la cirklo prenas privilegian valoron. Ili vidas en ĝi la plej belan formon, la plej perfektan. Astronomio devas pravigi la ŝajnojn, aŭ, laŭ la tradicia formulo, “savi la fenomenojn”, konstruante geometriajn skemojn, en kiuj la movadoj de ĉiuj astroj fariĝos cirklaĵoj.

Samtempe ni devas konstati, ke la politika sfero ŝajnas ankaŭ solidara je spaca reprezentado kiu intence emfazas la cirklon kaj la centron, donante al ili tre difinitan signifon. Tiuflanke oni povas diri ke la apero de la civito unue karakteriziĝas per transformiĝo de la civita spaco, nome la urboplano. En la helena mondo, eble unue en la kolonioj, aperas nova urboplano, kie ĉiuj konstruadoj estas centralizitaj ĉirkaŭ placo nomita agoro.

Plurajn jarcentojn antaŭ la grekoj, la fenicaj komercantoj trasulkis Mediteraneon. Ankaŭ la babilonianoj estis komercantoj, kiuj finpretigis komercajn kaj bankajn teknikojn pli perfektajn ol tiuj de la grekoj. Nek ĉe la unuaj, nek ĉe la duaj, oni renkontas agoron. Por ke agoro ekestu, necesas socia vivsistemo implicanta por ĉiuj publikaj aferoj publikan debaton. Tial ni vidas ke la publika placo aperas nur sur la ioniaj kaj grekaj insuloj. La establo de la agoro stampas la aperon de la pricivitaj politikaj institucioj.

Historie, el kie devenas tiu ĉi agoro? Ĝi ja havas pasintecon. Ĝi estas ligita je iaj karakterizaj kutimoj de la hinda-eŭropaj grekoj, ĉe kiuj ekzistis klaso de militistoj, apartigita disde la terkulturistoj kaj paŝtistoj. Oni renkontas ĉe Homero la dirmanieron λαον αγειρειν [*laon ageirein*], t.e. kunvenigi la armeon. La militistoj kunvenas laŭ militista formacio: ili faras cirklon. En la tiel desegnita cirklo troviĝas spaco kie komenciĝas publika debato, per tio, kion la grekoj nomas ἰσηγορία [*isēgoria*], rajto al libera parolo. Komence de la dua kanto de la Odiseado, Telemako tiel konvokas la “agoron”, nome li kunigas la militistan aristokrataron de Itako. La cirklo estas fermita, Telemako iras enen kaj staras εν μεσω [*en mesō*], en la centro; li prenas la sceptron kaj libere parolas. Kiam li finis, alia prenas la sceptron kaj respondas al li. Tiu asembleo de “egaluloj”, kiu konsistas el la militistoj, desegnas cirklan kaj centralizan spacon, kie ĉiu povas libere diri laŭplaĉe. Tiu militista kuniĝo fariĝos, post ekonomikaj kaj socialaj aliĝoj, la “agoro” de la civito kie ĉiuj civitanoj (unue minoritato de aristokratoj, poste tutaĵo de la dēmos [*popolo*]) povos debati kaj komune decidi pri la aferoj, kiuj kolektive ilin koncernas. Temas do, pri spaco celanta al diskutado, pri publika spaco kontraste al hejmaĵoj, pri politika spaco kie oni libere diskutadas kaj argumentadas.

Estas signife, ke la diresprimo εν κοινω [*en koinō*], kies politikan signifon ni substrekis: fariĝi publika, kunigi — havas sinonimon, kies spaca valoro estas evidenta. Anstataŭ diri, ke demando estas metita εν κοινω [*en koinō*], ke ĝi estas publike debatita, oni povas diri ke ĝi estas lokita εν μεσω [*en mesō*], ke ĝi estas metita en la centron, metita en la mezon. La homa grupo faras pri si mem jenan bildon: flanke de la privataj, apartaj domoj, estas centro kie la publikaj aferoj estas debatataj, kaj tiu centro reprezentas ĉion, kio estas “komuna”, la kolektivo kia ĝi estas. En la mezo ĉiu estas egala je la alia, neniu estas submetita al iu ajn. En tiu libera debato kiu stariĝas meze de la “agoro”, ĉiuj civitanoj difinas sin kiel ἴσοι [*isoi*], egalulojn, ομοιοι [*omoioi*], similulojn.

Ni vidas naskiĝantan socion kie la homaj interrilatoj estas pripensitaj sub la formo de rilatoj de identeco, de simetrio, de inversebleco. Anstataŭ, kiel en la mita spaco, etaĝan mondon kun la reĝo ĉe la pinto kaj malsupre de li tuta hierarkio de sociaj statusoj difinitaj per vortoj de superregado kaj submetiĝo, la civitomondo staras per egaligitaj kaj inversigeblaj rilatoj kie ĉiuj civitanoj sin

difinas unu al la alia kiel identaj sur la politika kampo. Oni povas diri ke, per la aliro al tiu cirkla kaj centraliza spaco de la “agoro”, la civitanoj enkadriĝas en politika sistemo, kies leĝo estas: ekvilibro, simetrio, reciprokeco.

Por kompreni la rilatojn inter la politikaj institucioj de la civito, la nova urba kadro kaj la alveno de nova mondobildo, necesas atenti al personoj kiaj Hipodamos de Mileto. Li venas jarcenton post Anaksimandro, sed li partoprenas la saman pensmanieron. Al kio celas lia aktiveco? Lia tasko estas rekonstrui Mileton post la detruo de la urbo fare de persoj (494_{AKE}). Li rekonstruas laŭ baza plano (*plan général*), kiu celas raciigi la urban spacon. Anstataŭ arkaikeca civito, simila al niaj mezepokaj urboj, kun labirintaj stratoj malorde disruliĝantaj la deklivojn de monteto, li elektas vastan spacon, per rektoŝnuro strekas la stratojn, kiuj laŭ rekta angulo kruciĝas, kreas damtabuloforman urbon, tute centralizitan je la placo “agoro”.

Pri tiu Hipodamos, ni diras ke li estas arkitekto, la unua granda urboplanisto arkitekto de la greka mondo. Sed, Hipodamos estas unue politika teoristo, kiu konceptas la organizadon de urba spaco kiel elementon inter aliaj de la raciigo de la politikaj rilatoj. Ankaŭ li estas astronomo, kiu prizorgas “meteorologion”, nome studas la astrojn. Oni ĉi tie tuj ekkaptas kiel renkontiĝas ĉe ununura homo astronomiaj prizorgoj pri la ĉiela sfero, la serĉado pri la plej bonaj politikaj institucioj kaj klopodo konstrui urbon laŭ geometria modelo raciigita.

La komediaŭtoro Aristofano povus liveri duan ekzemplon. En sia komedio *La birdoj* li enscenigas kun la celo ridindigi astronomon Metono, pri kiu ni scias ke li sukcesis akordi la komputon de la lunaj monatoj kaj de la suna jaro. Aristofano prezentas lin trapaŝeganta la urbon deklarante: “Mi mezuros per rekta ortilo, kiun mi aplikas por ke la cirklo fariĝu kvarangula, kaj meze de ĝi situas la ‘agoro’: tute rektaj stratoj kondukos al ĝi, konverĝante al centro mem kaj, kiel el astro mem ronda eliros ĉiudirekte rektaj radioj.” Diroj, kiuj provokas tiun admiroplenan ekkrion de la spektantoj: “Tia homo estas Taleso!”

Metono provas solvi la problemon de la cirklokvadrato. Li pretendas desegni la planon de cirkla urbo, kies stratoj kruciĝas je rekta angulo ĉar tio estas simpla kaj racia; sed ĉiuj stratoj devas konverĝi al la centro ĉar ne ekzistas homa civito kiu ne havas en sia centro publikan placon kaj ĉar ĉiu homa grupo konstituas kvazaŭ cirklon. Plie, ni notu referencon al astronomiaj konsideroj je sunaj radioj: ili estas ja naturaj ĉe tiu arkitekto kiu estas samtempe astronomo.

Tiuj du ekzemploj instigas pensi ke povus esti tre striktaj ligoj inter la reorganizado de la socia spaco kadre de la civito kaj la reorganizado de la fizika spaco en la novaj kosmologiaj konceptoj.

Ni reprenu la tekstojn de Anaksimandro por detale observadi la vortotrezoron, la fundamentajn konceptojn, la ĝeneralan organizadon. Se la

tero senmova staras meze de la ĉiela cirkla perimetro, tio estas, diras Anaksimandro, kaŭze de ĝia ομοιοτης [*omoiotēs*], t.e. simileco (ni dirus ke pro ĝia egaleco de distanco rilate al ĉiuj punktoj de la cirkla perimetro); ankaŭ kaŭze de ĝia ισορροπια [*isorropia*], de ĝia ekvilibro aŭ simetrio; Anaksimandro aldonas ke, situante je la centro, μεση, επι του μεσου, περι το του κοσμον [*mesē, epi tou mesou, peri to tou kosmon*], la tero ne estas υπο μηδενος κρατουμενη [*upo mēdenos kratoumenē*], superregata de iu, ĝi ne estas subigita al io ajn.

Kion fari en tiu astronoma skemo, tiu ideo de “superregado”, kiu estas el “politika” kampo, nefizika? Ĉar en la mita bildo pri la universo, la tero por resti stabila, devis sin apogi sur io alia ol si mem, de kiu sekve ĝi dependis. La fakto, ke la tero bezonis bazon, implikis ke ĝi ne estis tute sendependa, ke ĝi estis subigita al pli forta realeco. Kontraŭe, ĉe Anaksimandro la centra karaktero de la tero signifas ĝian “aŭtonomion”.

Nu, se ni prenas tekston de la historiisto Herodoto, politika teksto ĉi-foje, ni estas trovontaj la saman vortotrezoron, la samajn fundamentajn nociojn, kaj eĉ la saman konceptan solidarecon inter la ideoj “centro”, “simileco”, “ne superregado”. Herodoto rakontas ke, je la morto de la tirano Polikrato, en Samoso, la posteulo de li elektita, Maiandrioso, kredanto pri la demokratia idealo, rifuzas akcepti la potencon. Li do, konvokas la asembleon. Li kunvenigas en tiun privilegiitan cirklon, en tiun centron de la homa komunumo, ĉiujn civitanojn de la urbo por diri al ili, ke li malaprobis Polikraton kiu tirane regis homojn, kiuj estis liaj ομοιοι [*omoioi*], similuloj; pro tiaj kondiĉoj, li decidis formeti la κρατος [*kratos*], la potencon εν μεσω [*en mesō*], en la centro (nome resendi al la komunumo de ĉiuj civitanoj tion, kio estis uzurpita de unu individuo) kaj proklami la Ισονομια]*Isonomia*]¹. Tiu ĉi rimarkinda parareleco en la vortotrezoro, la konceptoj, la strukturo de la pensmaniero ŝajnas konfirmi nian hipotezon, ke la nova sfera mondebildo eblis per la ellaboro de nova bildo de la homa socio kadre de la institucioj de la civito, πολις [*polis*].

Ni pluen puŝu la analizon kaj provu submeti nian tezon je ia eksperimenta konfirmo, je la kondiĉoj kiujn provizas la historia esplorado. Ni prenu, je unu ekstremo, la signifon kaj la valorojn de la mezo en la mita universa bildo; kaj, ĉe alia, la geometrian nocion de la centro en la kosmologio de Anaksimandro. Ni ekzamenu kiel efektive fariĝis, ĉe tiu preciza punkto, la transiro.

Du terminoj signifas la centron en la religia penso de la helenoj. Unu estas *omphalos*, kiu signifas la umbilikon, la alia estas *Hestia*, kiu signifas la hejmon. Kial *Hestia* estas centro? La domo formas hejman spacon, bone limigitan al si

¹ T.e. egalecon de ĉiuj personoj.

mem, spacon diferencon de tiu de la aliaj domoj; ĝi propre apartenas al familia grupo, ĝi donas al ĝi apartan religian kvaliton. Tial, estas necese, kiam fremdulo eniras la domon, ke oni unue konduku lin al la fajrejo. Li tuŝas la fajrujon. Tiel, li estas enigita en la spacon de la domo, kies gasto li estas.

La fajrujo, starigita centre de la hejma spaco, estas en Grekio fiksa fajraltaro, enplantita en la grundo. Ĝi estas kvazaŭ la *omphalos* de la domo, la umbiliko, kiu enradikigas la homan domon en la profundaĵojn de la tero. Sed samtempe ĝi estas kiel kontaktopunkto inter la ĉielo kaj la tersurfaco, vivejo de la mortemuloj. Ĉirkaŭ la cirkla fajrejo, en la granda ĉambro, kiun la grekoj nomas *megaron*, kvar kolonetoj aranĝas tra la tegmento lumaperturon, tra kiu la fumo eliras. Kiam oni ekbruligas la fajron sur la fajrejo, la altiĝanta flamo estigas komunikadon inter la tera domo kaj la dia mondo. La “centro” de la fajrejo estas do la punkto de la grundo, kie realiĝas por unu familio kontakto inter la tri kosmaj niveloj de la universo. Ĝi plenumas la transiron el tiu ĉi mondo al aliaj mondoj. Tiu estas la mita bildo kiun reprezentas *Hestia*. Kaj ĉiu hejma centro, ĉiu fajrejo de ĉiu domo estas diferenca de la aliaj. Inter fajrejoj estas ia malkongruo. La diversaj fajrejoj ne povas “miksiĝi”.

Nu, kio okazas je la tempo de la civito? Kiam oni establas la “agoron”, tiu spaco kiu ne plu estas hejmeca, kiu kontraŭe formas spacon komunan al ĉiuj, spacon publikan kaj ne privatan, tiu spaco fariĝas je la okuloj de ĉiuj la vera centro. Por marki la valoron de la centro, oni starigas en ĝi fajrejon kiu ne plu apartenas al aparta familio, sed kiu reprezentas la tutan politikan komunumon: tio estas la fajrejo de la civito, la komuna fajrejo, la *εστια κοινή* [*estia koinē*]. Tiu komuna *Hestia* aperas kiel simbolo malpli religia ol politika. De tiam ĝi estas la centro ĉirkaŭ kiu ĉiuj homoj kunvenas por marĉandi kaj racie pridiskuti siajn aferojn. Kiel politika simbolo *hestia* devas ĉeesti en ĉiu fajrejo, sen identiĝi je iu ajn. Oni povus diri, ke ĉiuj fajrejoj de la diversaj domoj estas iel je la sama distanco de la Publika Fajrejo, kiu egale reprezentas ĉiujn sen intermiksiĝi kun unu pli ol kun alia.

Hestia ne plu servas por distingi domojn, starigi kontaktojn inter la kosmaj niveloj; ĝi nun esprimas la simetron de ĉiuj rilatoj, kiuj en la sino de la civito kunigas la egalajn civitanojn. Politika simbolo, *hestia* difinas la centron de spaco konsistanta el inversigeblaj rilatoj. Politikasence la centro povos servi kiel mediacio, interaĵo inter la malnova mita bildo de la centro, kaj la nova racia koncepto de la egaldistanca centro en matematika spaco farita de tute reciprokaj rilatoj.

Ĉu efektive la aferoj tiel okazis? Unu observado ŝajnas alporti al ni tion, kion ni nomis eksperimenta konfirmo. La nomo kiun donas la filozofoj al la tero, senmova kaj fiksa, centre de la kosmo, estas precize *hestia*. Kiam la astronomoj kaj la aŭtoroj de kosmologio volis marki la centran pozicion de la

tero en la ĉiela sfero, ili diris ke la tero estas la fajrejo de la universo. Ili do antaŭenĵetis sur la naturmondon la bildon de la homa socio sub la formo, kiun la *polis* donis al ĝi. Tra la ŝanĝoj de la simbolismo de *hestia*, ni ekkaptis la transiron de mita bildo al politika kaj geometria nocio; ni komprenas kiel la alveno de civito, la publika diskutado, la socia “modelo” de homa komunumo konsistanta el “egaluloj”, ebligis ke la penso raciigu, malfermu sin al nova prispaca koncepto, esprimiĝante samtempe sur tuta serio da kampoj: en la politika vivo, en la aranĝo de la urba spaco, en la kosmologio kaj la astronomio.



Paskinsulo

korektoj

Necesas atentigi pri pluraj (kompost)eraroj en Mirmekobo 15 (oktobro 2011):

Verkis la tekston sur paĝo 26 Françoise Noireau, ne François Noireau.

La titolo de la verko komenciĝanta sur paĝo 27 estas “la patrujamanto” (**ne** “La unurublulo”).

Sur paĝo 15 anstataŭ “mond(o)mastron” estu “mod(o)mastron”.

Kaj atentigis nin Marcel Lemeltier pri la artikolo “Geometrio kaj sfera astronomio en la unua greka kosmologio”: “temas pri traduko de libroĉapitro: ‘Mythes et pensée chez les grecs’ de Jean-Pierre Vernant.”

ŝercoj kaj anekdotoj

(El kolektaĵo de eldona agentejo RIZNICA, Beograd 2009, farita de Miodrag-Miša Vujović) Tr. Jadranka Mirić (Serbio)

JAROJ

“Knabo, kiom da jaroj vi havas?” demandas onklo la knabon.

“Mi ne scias!” li respondas.

“Kiel vi ne scias?”

“Ja, kiam mi estas kun panjo mi havas sep jarojn, kun paĉjo mi havas dek jarojn, kaj se mi estas en trajno aŭ en buso ĉiam mi havas kvar jarojn” respondas ridete la knabo.

LUMO

“Vi vere kredas ke sur Luno ekzistas loĝantoj?” kamarado demandas kamaradon.

“Kiel ne! Ĉu vi ne vidas ke tie ĉiuvespere lumas?”

MALSANO

“Paĉjo, ĉu vi permesos al mi ke mi restu hejme hodiaŭ? Mi fartas malbone.”

“Kaj en kiu loko vi sentiĝas malbone?”

“En lernejo!”

SPEGULOJ

“Kion faras via patro?”

“Li faras spegulojn.”

“Kaj kion faras panjo?”

“Ŝi speguliĝas.”

mitologio

Sizifo (Σίσυφος)

Komentoj de Donald Broadribb

Kvankam la mito pri Sizifo estas multe aludata en la monda literaturo (tamen precipe en la romano de Albert Camus, *Le Mythe de Sisyphe* [1942]), preskaŭ neniu mencio aŭ teksto pri tiu mito plu troveblas en la antikvaj grekaj verkoj. Tamen en *Odiseado* de Homero estas kurta versaro. Proze tradukite, la teksto diras:

Kaj poste, en lia doloroplena turmento, mi vidis kiel Sizifo penadis per ambaŭ manoj levi pezegan rokon. Li apogis sin per la brakoj kaj piedoj, kaj penegis puŝi ĝin supren. Sed ĝuste kiam li preskaŭ sukcesis puŝi tiun ŝtonon trans la kreston, ĝia netolerebla pezo ŝanĝis sian direkton. La kruela roko retroruliĝis sur la grundon. Sekve de tio, li strebegis repuŝi ĝin supren laŭ la deklivo. Liaj membroj ŝvitadis, kaj polvo leviĝis de lia kapo.

Fragmentoj el perdita dramo de Eŝilo mencias Sizifon, sed ne diras la detalojn.

Laŭposthelenaj aludoj, Zeŭso kondamnis tiranon Sizifon eterne kaj senpaŭze refaradi tiun puntaskon, ĉar lia tirana misagado estis nepardonebla.



Bildo sur poto ĉ.530_{ake} (en Muzeo Staatliche Antikensammlungen, Munĥeno)

noveleto

Rudolfo kaj la internacia monopolema kompanio

de Donald Broadribb (Aŭstralio)

Rudolfo tajpis la lastajn ciferojn en sia teksto, fermis la dosieron, kaj musumis sur la piktogramo kiun li estis desegninta por sia nova programo. La komputilo ekpaneis.

“Damne!” li krietis al si, nelaŭte por ke eventualaj subaŭskultiloj ne povu aŭdi lin.

Ĉiam en la antaŭparto de lia menso restis timo ke iu internacia monopolema firmo subaŭskultas liajn sonojn per kaŝitaj aŭ eĉ mikroskope malgrandaj iloj.

“Mi malsatas,” li murmuris al si. Li zorge refunkciigis la komputilon, kaj PGP-igis¹ la koruptitan² dosieron kiu ĵus paneigis la komputilon.

Li foriris de sia amata komputilo en la kuirejon kaj el la fridujo prenis nove bakitan panon.

Li detranĉis iom mallerte kelkajn tranĉaĵojn, surŝmiris buteron kaj arakidaĵon, kaj avide manĝis. Post tio li verŝis en tason bolintan akvon kaj envŝutis kuleron da kafpulvoro. Efektive, al li tre malplaĉis la gusto de kafo, do li enŝutis ankaŭ duonkuleron da cinamo por kaŝi la guston, kaj ankaŭ kelkajn grajnoj da zingibro por kaŝi la tro fortan guston de la cinamo. Sekvis kulerego da sukero. Laste li enverŝis grandan kvanton da lakto, por kaŝi la guston de la tutaĵo. Grimacante, li englutis la kaftrinkaĵon kiel eble plej rapide, tial brogis la mukozon de sia buŝo, kaj rekriis “damne”, ĉifoje tre laŭte.

La 6an de aprilo:

Rudolfo tajpis la lastajn ciferojn en sia teksto, jam la kvindektrian fojon. Trovinte ke la komputilo ne paneis, li hurais. Ke la nove verkita programo rifuzis tamen funkcii ne multe ĝenis lin. Li riparos ĝin, sendube.

La 8an de aprilo:

Revenante de butikoj, Rudolfo rimarkis multe da fumo leviĝanta enĉielen. Ju pli li proksimiĝis al la strato kie li loĝis, des pli densis la fumo. Fine li atingis la

¹ PGP estas la nomo de kodprogramo por komputiloj, kiu protektas verkitan tekston tiel ke neniu nerajtigita persono povas legi ĝin. Ĉar ĝi estas klasifikita kiel “armilo”, estas kontraŭleĝe eksporti tiun kodprogramon ekster Usonon. Tamen ĝi estis kontrabandita eksterlanden kaj estas multe uzata en ĉiuj landoj kie ekzistas komputilistoj dezirantaj kaŝprotekti siajn komputiltekstojn.

² “Korupta teksto” estas teksto kiu, pro misformiĝo, paneigas komputilon.

straton de sia nun plene forbrulinta domo — eble pli ĝuste nominda “eksdomo”.

“Damne! Damne! Damne!” li kriis, kolerege. “Antaŭ nur tri horoj mi sukcesis funkciigi kaj provi mian nove verkitan programon, kaj nun ili detruis ĝin! Damnege!”

“Ili” kompreneble estis la internacia monopolema firmo kiu, laŭ lia tute neŝancelebla kredo, volas ŝteli lian nove verkitan programon; aŭ, se tio ne eblos, detruu kaj ĝin kaj lin.

Kiam li aŭdace publikigis tiun supozatan fakton en letero al la redaktoro de bone konata fakrevuo por komputilistoj, la “internacia monopolema firmo” minacis procesi kontraŭ li en tribunalo. Do de tiam li nur esprimis sian opinion pri ĝi en privataj konversacioj, plejparte tiuj kun si mem.

Sed nun estis pruvite ke la internacia monopolema firmo celas detruu lian programon kaj lin. Aliel, kial la domo estus komplete forbrulinta?

Incendifakuloj atentigis lin ke kaŭzis la brulegon neestingita gasfajro sub la akvokaldroneto uzata por pretigi liajn kafmiksaĵojn. Sed li sciis ke ili eraras.

La 15an de novembro:

Rudolfo ekloĝis domon, aĉetitan per mono veninta de la asekur-kompanio post la forbrulo de la antaŭa domo. En la nova domo estis neniu gasaparato, nur elektraj aparatoj. Eble pro tio la nova domo ne incendios. Tion deklaris liaj konatoj. Li mem opiniis ke la internacia monopolema firmo rezignis ripeti sian fiagon, kaj decidis alimaniere ataki lin.

La 3an de januaro:

Rudolfo funkciigis sian nove reverkitan programon, kaj ĝi nek paneigis la komputilon nek rifuzis funkcii. Ĝi funkciis neglate, kompreneble, tamen ĝi ja funkciis. Nu, iomete, ĉar ĝi ja estis nur provmodelo de la estonta plenpreta programo per kiu li — laŭ sia espero — revoluciigos la komunikindustrion kaj samtempe riĉiĝos, eĉ midasiĝos.¹

Mallonge: Rudolfo kredis povi verki komputilprogramon kiu kapablos traduki kian ajn tekston el kiu ajn lingvo en kiun ajn alian lingvon, aŭtomate kaj altkvalite. Eĉ poemojn kaj aliajn literaturaĵojn.

La provprogrameto kiun li ĝis nun verkis nur kapablis traduki kelkajn frazojn el la japana lingvo en la anglan. Efektive, li neniam studis la japanan lingvon, do li utiligis japan-anglan leksikonon por enkomputiligi la signifojn de la diversaj japanaj vortoj. Sed tio vere ne gravis; kio gravis estis ke la programeto funkcias.

¹ Midaso: legenda reĝo kiu kapablis ŝanĝi je oro ĉion tuŝatan de li.

Nu, li nur provis perkomputile aŭtomate traduki la frazojn “La kato ronronas” kaj “La akvo bolas en la potoj”. Sed tiuj du frazoj tute sukcese tradukiĝis. Proksimume. Efektive la komputilo skribis “La akvo pias en la potoj”, sed tiu erareto estos facile korektebla. Ĉio nova estas almenaŭ iomete korektenda antaŭ ol esti perfekta.

La 9an de februaro:

La multe uzita Toyota Camry de Rudolfo ekeksplodis. Li mem ne estis grave vundita. Nu, li ja devis esti riparata dum kelkaj monatoj en hospitalo, sed li tamen pluvisis. Haŭto de lia gluteo anstataŭis damaĝitan haŭton de lia maldekstra vango. Sed iom da ŝminko sukcese kaŝis la riparitan vundon. Preskaŭ.

Aŭtofakistoj deklaris ke la aŭto ekeksplodis ĉar fajrero el la elektra sistemo de la aŭto trafis tralikiĝantajn benzingutojn el la benzinujo. Sed Rudolfo certis ke kulpas la internacia monopolema firmo. Nu, tiaj firmoj kredas ke ili rajtas fari kion ajn por protekti sin kontraŭ konkuremuloj; ĉu ne tion scias ĉiuj komputilistoj?

La 17an de decembro:

Rudolfo veturigis sian novan aŭton, aĉetitan per mono donita al li de la asekur-kompanio, en butikon aĉetis amason da manĝaĵoj, kaj reveturis per ĝi al sia hejmo. La nova Mitsubishi Magna bonege funkciis. Multe pli bone ol la iama multe uzita Toyota Camry. La nova aŭto nek paneis nek eksplodis. Do denove li venkis kontraŭ la fiplanaĉoj de la internacia monopolema firmo. Sed kiam li publikigis tiun deklaron en la tagĵurnalo de sia hejmurbo, la internacia monopolema firmo minacis enkarcerigi lin pro kalumniado. Do li humile pardonpetis al ĝi, en sekva deklaro en la tagĵurnalo.

En sia domo Rudolfo pretigis sandviĉon kaj kaftrinkaĵon. Pleniginte sian stomakon per ili, li repaŝis al sia komputilo. Funkciigite ĝin, li trovis ke la tuta malmola disko estas senenhava¹. Evidente, dungita spiono de la internacia monopolema firmo eniris lian domon dum li butikumadis, kaj nuligis ĉiujn tekstojn sur la malmola disko.

Komputilriparistoj deklaris ke tion faris komputilviruso kiun li senscie kaptis per Interreto. Tia viruso jam detruis milojn da horoj da laborado de aliaj komputiluzantoj. Sed Rudolfo certis ke pagis la internacia monopolema firmo al la riparistoj por ke ili diru tion kaj tiel protekti la fikulpan kompanion.

La 28an de februaro:

¹ La malmola disko interne de komputilo konservas tekstojn dum ne uzas ilin la komputilisto.

Rudolfo fiere skribis la lastajn ciferojn de sia denove reverkita tradukoprogramo. Li provis ĝin. Ne nur ne paneis la komputilo, sed la tradukaĵo nun ĝuste diris “La akvo bolas en la potoj”. Ial “La kato ronronas” iĝis “La domo ekstremos”, sed tio estos facile korektebla per iom da reverkado de la programeto. Krome, la programo nun kapablis, preskaŭ ĝuste, traduki la samajn frazojn el la sveda kaj la kupia lingvoj.¹ Do granda progreso, tute klare. Rudolfo aranĝis novan konton ĉe sia banko, en kiun li povos meti la monon ricevotan pro la nova programo.

Li ankaŭ kopiis la PGP-igitan nove reverkitan programon sur du ekstrajn diskojn. Unu el la ekstraj diskoj li kaŝis sub sia lito. La alian li metis en sekuran keston en la banko. Do, nenia nova misfunkcio de la komputilo povos redetrii la programon.

La 7an de marto:

Tertremego skuis la urbon, detruante la bankon. Ankaŭ la novan domon de Rudolfo, kaj lian komputilon. Strange, ĝi ne detruis la ekstran diskon kaŝitan sub lia lito. Li certis ke ĝi saviĝis ĉar pri ĝi ne sciis la internacia monopolema firma. Geologoj insistis ke la tertremon kaŭzis natura moviĝo de la kontinentaj platoj de la tero. Sed Rudolfo suspektesis ke la fifamaĉa firma eksplodigis nuklean bombeton tuj sub lia domo. Li estis intervjuita pri tio en televida programo. Sed la internacia monopolema firma minacis devigi lin punpagi milionojn da dolaroj pro la akuzaĉo, do li devis publike deklari sian kredon erara, en la sama programo.

La 8an de majo:

Rudolfo ekloĝis en nove aĉetita domo en Melburno, multmil kilometrojn for de lia iama loĝurbo. En lia poŝto estis la disko kiun ne difektis la tertremo en marto. Li aĉetis tute novan kapablegan komputilon, zorge konektis ĝin al Interreto, legis la plej novajn informojn enretigitajn de la internacia monopolema firma, i.a. anoncon pri nova programkorekto.

Laŭ la novaj informoj, la internacia monopolema firma trovis ke ilia retlegilo estis grave difekta: ĝi ebligas ke komputile tre klera persono konektita al Interreto povus legi la enhavon de la malmola disko de kiu ajn alia persono konektita al Interreto. Tion ne povus fari ĉiu ajn, nur lertega fakulo scianta aŭ diveninta ĝustan metodon, tamen ĝi ja estis farebla. La internacia monopolema firma hontoplene agnoskis la difekton de sia programo kaj al ĉiu kiu volis, ĝi disponigis, senpage, sendifektan programon.

Kompreneble Rudolfo akceptis tiun proponon; tamen li ne timis pri sia

¹ La Kupia lingvo estas parolata de kelkcent personoj en obskura regiono de Hindio.

projekto, ĉar li certis ke pro ĝia PGP-iĝo neniu alia ol li povus legi ĝin.

Li tre forte dediĉis sin al klopodo devigi sian tradukoprogramon ĝuste traduki la frazon pri la kato.

La 13an de majo:

Dum Rudolfo manĝadis sandviĉon kaj kaftrinkaĵon, fulmo ektrafis lian domon, kaj detruis liajn telefonon, modemon, kaj komputilon. “Atmosfera anomalia,” diris meteorologo kiun li konsultis. “Tio povus trafi iam ajn, ja la sunmakuloj estas tre aktivaj nunsezono.”

Sed Rudolfo opinis ke pli verŝajne kulpas la internacia monopolema firmo, kiu per sia “sendifektigita” programo sendis fortegan fluon de elekro en liajn telefonon kaj komputilon.

La 15an de majo:

Rudolfo aĉetis novan komputilon.

La 29an de decembro:

Rudolfo triumfe provis sian programon, kiu nun kapablis traduki ĝuste tri frazojn, unu eĉ longan: “La akvo bolas en la potoj,” “Mi legas libron,” kaj “Ĉar la akvo bolis en la potoj, mi preparas teon.” Bedaŭrige, “La kato ronronas” iel redifektiĝetis, kaj nun tradukiĝis “La elefanto ronronas”.

“Damnege damne!” kriegis Rudolfo, tute forgesante ke eble subaŭskultilo estis kaŝita en la mikroond-kuirilo, far la internacia monopolema firmo. Aŭ eble en la tenilo de la sukerujo.

“Eble neniu rimarkos tiun erareton,” li murmuris al si. Li zorge PGP-igis sian reviziitan tekston, nuligis, kiel ĉiam, la normallegeblan tekston, kaj kopiis ĝin sur du diskojn; unu el ili li konservas en nova sekurkesto en la banko, la alian li kaŝos en supra branĉo de alta arbo apud la domo.

La 2an de februaro:

La internacia monopolema firmo anoncis la aperigon de sia kopirajtita nova lingvotradukoprogramo, kapabla traduki ĉiujn tekstojn, ĉialongajn, el la franca, kupia, japana kaj sveda lingvoj en la anglan, kaj inverse.

Diversaj komputilfakuloj laŭdis la novan programon, dirante ke ĝi estas nekredible genia laboraĵo, multe pli zorge kaj kompetente farita ol ĉiu antaŭa komputiloprogramo eldonita de tiu kompanio.

La nova programo kaŭzis kvazaŭevolucian en la komunikadindustrio, kaj ĉe la borso la prezo de la akcioj de la firmo plialtiĝis de \$34 ĝis \$794. La Usona Departemento de Justico tuj petis la Plejsuperan Tribunalon de Usono

konsideri proceson kontraŭ la internacia monopolema firmo, pretendante ke tiu firmo per sia nova programo akiras praktikan monopolon je la traduk- kaj interpret-servoj en ĉiuj institucioj, kaj en la komunikadindustrio. Ĉar monopoloj estas kontraŭleĝaj en Usono, la firmo devu ĉesi vendi sian novan programon.

La 3an de februaro:

Rudolfo oficiale iniciatis propran proceson en tribunalo aŭstralia, pretendante ke la internacia monopolema firmo ŝtelis de li la novan tradukoprogramon, kiu estas identa kun tiu kiun li jam de pluraj jaroj preparas.

Li agnoskis ke lia programo (kies diskojn li estis neklarigeble tamen perdinta) kapablis traduki nur kvar frazojn, dum la nove eldonita programo de la internacia monopolema firmo kapablas traduki senliman kvanton da frazoj kaj tekstoj.

Malgraŭ tio, laŭ lia argumento, estus malkredinda koincido ke la nova programo de la internacia monopolema firmo tradukas inter la angla, Kupia, kaj Sveda lingvoj, ekzakte same kiel lia propra programo; kaj ke la teksto “La kato ronronas” mistradukiĝas per la nova programo tiel: “La elefanto ronronas”.

La internacia monopolema firmo pagis plurmilionojn da dolaroj al ekspertaj advokatoj por kontesti lian proceson.

Kvin jarojn poste, la 27an de februaro:

La Plejsupera Tribunalo de Usono decidis ke ĉar Rudolfo neniam kopirajtigis/patentis sian lingvotraduko-programon, li ne povas pravigi sian akuzon kontraŭ la internacia monopolema firmo.

Ok jarojn poste, la 18an de februaro:

La Internacia Kortumo, responde al peto far la registaro aŭstralia, akceptis ekzameni la eblon de proceso kontraŭ la internacia monopolema firmo.

Sep jarojn poste, la 3an de novembro:

La Internacia Kortumo verdiktis favore al Rudolfo.

La 5an de novembro:

Ĉar Usono ne agnoskas la aŭtoritaton de la Internacia Kortumo, ĝi rifuzis duafoje konsideri la kverelon inter la internacia monopolema firmo kaj Rudolfo.

La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo (*Myrmecobius fasciatus*) estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla senpage, kaj ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per viaj legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin.

Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, por peti ekzempleron aŭ por peti abonon, kaj por sendi kontribuajon: donbroadribb@mirmekobo.com

Abono al la revuo estas senpaga. Ĉar neniu surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Se vi deziras mem per via komputila presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari laŭdezire kaj senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas neniun ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspecaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobiaj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj... Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos. Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornaĵojn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuajon, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

© kopirajto apartenas al la verkinto de kontribuajo.

Represo de kontribuajo estas permesata, se permeson konfirmas ĝia verkinto. Malnovaj numeroj de *Mirmekobo* troviĝas ĉe [mirmekobo.com](http://www.gazetejo.org/mirmekobo) kaj ankaŭ ĉe www.gazetejo.org/mirmekobo

Redaktoro: Donald Broadribb